

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni legis al vi la unuan legaĵon de la libro *Paŝoj al plena posedo* de William Auld. Ni kuraĝigas ĉiujn esperantistojn sisteme trastudi tiun legolibron kaj fari la lingvajn kaj gramatikajn ekzercojn, kiujn ĝi proponas.

A.- Hodiaŭ ni donos al vi ideon pri la varieco de tiuj ekzercoj, legante al vi tion, kion ili proponas.

Cl.- Jen ekzerco de la unua paŝo, kiu devigas la lernantojn distingi inter la sufiksoj **igi** kaj **iĝi** :

A.- « *En la sekvantaj frazoj, elektu la ĝustan vorton inter krampoj :*

Cl.- *Ĉar mi SUPOZIS/SUPOZIGIS lin fidinda, al li mi ne SUPOZIS/SUPOZIGIS la malveron.*

A.- *Unue li ENLITIGIS/ENLITIGIS siajn gefilojn, poste li ENLITIGIS/ENLITIGIS mem. »*

Cl.- Kaj tiel plu. Jen alia ekzerco, kiu koncernas la vortfaradon. Ĝi troviĝas en la **paŝo dua** :

A.- « *Sube estas dek substantivoj. Adjektivigu ilin, kaj uzu ĉiun korekte en propozicio : TRO DIO ESENCO ROBO PROBLEMO LUDO KLASO ONKLO SPEGULO FERIO. Ekzemple : METROPOLO metropola = La metropola bruego unue timigis lin. »*

Cl.- Ni trovas ekzercojn, kiuj petas la lernantojn aldoni la akuzativan finaĵon –N. Jen ekzemplo el la **paŝo tria** :

A.- « *En la sekvantaj propozicioj, aldonu, kie necese, la akuzativan finaĵon –N :*

1. *Mi staris sur la bordo kaj ĵetis ŝtonon en la maro.*

2. *Vi atingos Skotlandon la 22a de novembro. »*

Cl.- Kaj tiel plu. En la **paŝo kvara** ni trovas ekzercon pri la artikolo **la** :

A.- « *Kie la senco tion postulas, enmetu LA en la subajn propoziciojn :*

1. *Suno brilis, ĉielo estis blua.*

2. *Ni loĝas en ĉefurbo de mia lando.*

Cl.- Kaj tiel plu. En la **paŝo kvina** oni trovas klarigojn pri la substantivoj participaj.
« *Demandanto estas persono, kiu demandas. Demandinto estas persono, kiu demandis. Demandonto estas persono, kiu demandas. Demandato estas persono, kiun oni demandas. Demandito estas persono, kiun oni demandis. Demandoto estas persono, kiun oni demandas. Ili akceptas la sufikson –in, kiam temas pri ina persono. La persono, kiun mi amas, estas bela = [egalas al] mia amato estas bela aŭ mia amatino estas bela.*

A.- *Laŭ la supra ekzemplo reskribu jenajn propoziciojn, uzante kie necese substantivojn participajn :*

1. *Policianoj kaptis la personojn, kiuj ŝtelas. (Tio estas en la momento de la kapto). »*

Cl.- Kaj tiel plu. En la **paŝo sesa** ni trovas ekzercon pri la korelativoj :

A.- « *En ĉiu el la sekvantaj propozicioj, enmetu korekte unu el la supraj korelativaj paroj :*

1. *... [tri punktoj] estos venintaj la delegitoj, nur ... [tri punktoj] ni povos diskuti la aferon. »*

Cl.- La lernantoj devas skribi : **Kiam** estos venintaj la delegitoj, nur **tiam** ni povos diskuti la aferon.

A.- Iom post iom la legaĵoj longiĝas, kaj la lingvaj kaj gramatikaj ekzercoj fariĝas pli kompleksaj. Multaj lecionoj aŭ paŝoj estas dediĉitaj al la aktivaj kaj pasivaj adjektivoj

participaj. Ili tute certe helpas multajn esperantistojn pli bone kompreni la verajn nuancojn, kiuj ekzistas inter pasivaj AT kaj IT-participoj.

Cl.- Aliaj ekzercoj devigas la lernantojn montri la diferencon de signifo, kiu ekzistas inter la du vortoj en paro da vortoj kiel KUIRISTO-KUIRANTO, ĜENTILECO-ĜENTILEMO, FLAMO-FLAMADO, PLANDO-PLANDUMO, kaj tiel plu.

A.- En la **paŝo oka** ni trovas ekzercon, kiu devigas la lernantojn formi adverbojn. La frazo : « *En tiu norda regiono, li solecis kiel fremdulo* » fariĝas « *En tiu norda regiono, li solecis fremdule.* »

Cl.- Estas ekzercoj, kiuj kontrolas, ĉu la lernantoj korekte uzas la prepoziciojn. Jen ekzemplo el la **paŝo dekkvara** :

A.- « *En la subajn propoziciojn, enmetu korekte jenajn prepoziciojn : PO POR POST PRETER PRI PRO SEN SUB TRA TRANS.*

« *1. ... [tri punktoj] la manĝo, kiu kostis ... [tri punktoj] dudek steloj, ili ĉiuj foriris.* »

Cl.- La lernantoj devos skribi : **Post** la manĝo, kiu kostis **po** dudek steloj, ili ĉiuj foriris.

A.- Ni ne volas plilongigi tiun ekzemplaron. Kiel vi konstatis, fine ni troviĝas antaŭ lernolibro, kiu permesas sisteman ellernadon de esperanto. Kiel vi ankaŭ konstatis, en la studado de tiuj ekzercoj, estas bone esti gvidata de kompetenta esperantisto.

Cl.- En kolektiva trastudo de la libro *Paŝoj al plena posedo* estas bone malfermi diskutojn pri la hezitadoj de la lernantoj, ĝis kiam oni havas la certecon, ke ĉiuj bone komprenis. En tiuj klarigoj oni devas eviti tro oftajn tradukojn, sed kelkfoje ili estas tamen necesaj. En la prilingvaj babiladoj la gelernantoj sin reciproke korektu.

A.- La legaĵoj de la libro *Paŝoj al plena posedo* formas veran antologieton de belaj originalaj kaj tradukitaj verketoj. La studgvidanto povas kompletigi tiujn legaĵojn per kelkaj vortoj pri iliaj aŭtoroj. Tiam oni konsilu libro-titolojn por paŝi pluen, kiel diras William Auld.

Cl.- Cetere, fine de sia legolibro, William Auld proponas kelkajn titolojn de originalaj kaj tradukitaj libroj, kiuj estas legindaj. Li tute pravas kuraĝigi la studantojn de *Paŝoj al plena posedo* daŭre legi esperantaĵojn.

A.- Ni tre esperas, ke foje aperos libro, kiu donos informojn pri la plej bonaj libroj, kiujn ni povas legi en esperanto, ĉar estas iomete malagrabla devi legi dek stultaĵojn por mem fine malkovri konsilindan verkon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-